



**Numero 2024:26; julio 2.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Rifuĝintoj 100 KB. Sume 400 KB

## Poliglote en Prago

Maje ni sukcese okazigis la Poliglotan Kunvenon - [Polyglot Gathering!](#) Ĝi okazis por la unua fojo en Prago, Ĉeĥio. Ĝin partoprenis 735 poliglotoj el 71 landoj, kune parolantaj pli ol 172 lingvojn! Dum la aranĝo, la partoprenantoj kundividis sian amon pri kulturoj kaj lingvoj, interŝanĝis konsilojn kaj spertojn, kaj plej grave, uzis kaj ekzercis multajn lingvojn por diskuti, aŭskulti, lerni kaj amikumi. Kiel ĉiam, okazis pluraj programeroj rilataj al [#Esperanto!](#) Estis prezentoj de Louis Wunsch-Rolshoven kaj Michael-Boris Mandirola, Esperanto-budo dum *Polyglot Expo*, libroservo kun multaj libroj kaj spaco por praktiki Esperanton dum difinitaj horoj.

Okazis ankaŭ la tradicia Lingva Defio, dum kiu la partoprenantoj havis 50 tagojn por lerni la ĉeĥan aŭ Esperanton de nulo (**SMG:** divenu, kiu pli facilas ☺), kaj devis surloke trapasi mallongan ekzamenon. Ni gratulas la venkintojn!

Ni dankas al [Universala Esperanto-Asocio](#), kiu ĉi-jare estis sponsoro de la evento. Sekvajare ni planas okazigi du kunvenojn - retan kaj ĉeestan.

fotoj :[#polyglotgathering](#) [#polyglot](#) [#poligloto](#)

Leopold Patek, Aŭstrio

## Poemoj de Mao Zifu en ĉina recitado

La kvina Liaoninga Recitado de Esperantaj Poemoj, omaĝis al la verkaĵoj de Mao Zifu. Tio okazis fine de julio en Shenyang, Ĉinio. Mao Zifu, ĉina esperantisto, naskiĝis en 1963, diplomiĝis en la fakultato pri matematiko de la Hunana Normala Universitato en 1984, paraliziĝis pro trafik-akcidento en 1985 kaj eklernis Esperanton en 1986. En la 98-a UK li pro sia kontribuo al la originala Esperanto-poezio estis honorita per la Diplomo pri Elstara Arta Agado de UEA. Ekde 2022 li estas membro de la Akademio de Esperanto. Li estas unu el la plej gravaj nuntempaj poetoj en Esperanto. Li estas kripligita en korpo, sed firma en volo, kaj brave antaŭeniras fronte al malfacilaĵoj. La ĉi-jara recitado okazis en konvena loko: Shenyang Heping-distrikta Praktika Centro de Novepoka Civilizacio, kun la totala konstrua areo de pli ol 20 000 kvadrataj metroj. Rigardu ĉe [https://eo.wikipedia.org/wiki/Mao\\_Zifu](https://eo.wikipedia.org/wiki/Mao_Zifu)

## Nepala jarkunveno en Katmanduo

En la 19-a Jesta 2081 (la 1-a de Junio 2024), okazis la 27-a jara ĝenerala asembleo de NEspA en la Esperanto-oficejo en Thamelo (**SMG:** urbocentre de la ĉefurbo Katmanduo). Ĉeestis 32 membroj kaj pli ol ĝi konsentis telefone. Oni tralegis jaran raporton kaj sekvis financa raporto de la kasisto s-ro Ramesh Aryal. Oni diskutis ambaŭ raportojn kaj unuanime aprobis ilin. Prezidanto Indu Devi Thapaliya

eksiĝis el la estraro. La membroj elektis ok-kapan estraron unuanime. Aliaj tri mankantaj estraranoj estos elektitaj el diversaj regionoj. S-ro Baburam Neupane gvidis la sesion. Jen estas la nove elektitaj estraranoj :

*Prezidanto* : s-ro Bharat Kumar Ghimire, *Vic-Prezidanto*: S-ro Cholnath Pokharel, *Ĝenerala Sekretario* : S-ro Prakash Ghimire, *Kasisto*: s-ro Dipak Shrestha.

*Membroj*: S-roj Navin Lal Shrestha kaj Krishna Kanta Neupane, s-inoj Gayatri Sharma Bhattarai kaj Shila Manandhar.

La nove elektita prezidanto dankis la eksajn estraranojn pro ilia laboro. “La pasinta estraro frontis obstaklojn sed pro ilia senĉesa laboro nia movado estas en gloro.”

Je la fino kunvenestro de la elekta komitato Baburam Neupane, eksaj prezidantoj gesinjoroj Maya Rai, LP Agnihotry kaj Indu Devi Thapaliya deziris sukceson al la nova estraro.

Koncizigo de teksto de Prakash Ghimire, Ĝenerala Sekretario de NEspA

“Mi gratulas vin pro la formado de novaj estraranoj. La mondo estas en kaoso kaj unu el la ĉefaj agadoj de NEspA, la Himalaja Renkontiĝo, havas malfacilaĵon, sed mi kredas, ke la nova estraro sukcesos organizi ĝin daŭre kaj NEspA progresos plu. Mi estas ĉiam apud vi.

HORI Jasuo

UEA, KAOEM, Korea Esperanto-Asocio kaj mi pretas kunlabori kun vi, kolegoj de Nepalo. Samtempe KEA kaj mi deziras vian progreson kaj evoluon en la kadro de la tutazia Esperanto-movado. Esperante vidi la novan prezidanton okaze de la 3-a Komuna Esperanto-Kongreso en oktobro, en Jeonju, Koreio,

SO Jinsu, estrarano de UEA.

## Balkana diskutado

La 15-an de junio okazis virtuala Balkan-Danuba regiona kunveno. Partoprenis: Juri Andoni, Bardhyl Selimi (AL), Gradimir Kragić kaj Samir Ribić (BA), Renato Corsetti, (GB), Szabolcs István, (HU), Aurora Bute, (RO), Aranka Laslo, Jovano Zarković, Radojica kaj Danijela Petrović (RS).

Oni diskutis pri:

- la kongreso en Beogrado en aŭgusto, kies organizado progresas regule. Interalie estis kontaktoj kun la Ministerio pri Edukado, kiu promesis ĉeesti la inaŭguron kaj prelegi en ĝi. Anoj de Balkanio kaj Danubaj landoj bonvenas.
- la situacio de Esperanto en Bosnio
- la propono pri la organizado de la panonaj tagoj en postaj jaroj
- la komunikado de la Ministerio pri Edukado pri tio, ke la unuopaj lernejoj rajtas memstare decidi pri akcepto de proponoj pri prelegoj aŭ kursoj de Esperanto
- la ebloj de la kunvenintoj partopreni la kongreson en Beogrado

Oni fine decidis, ke la regulaj monataj kunvenoj reokazos ekde septembro.

Gvidis la kunvenon Radojica Petrović, protokolis Renato Corsetti

## Eŭropa agado ne ĉesis post la EU-elektoj

Post la eŭropaj elektoj rekomenciĝas la laboro de la Komisiono por agado en Eŭropo de UEA kunlabore kun EEU, EDE kaj ĉiuj aktivuloj por Esperanto en Eŭropo. La

laboro baziĝos sur kontaktoj kun la EU-politikistoj kaj -funkciuloj kaj sur praktika varba kaj instrua laboro pri Esperanto tra la landoj. Jen ekzemplo de la efiko de la laboro de EDE en Francio okaze de la elektoj, en kiuj EDE estis unu el la partioj, jen kiel altiĝis la serĉado de la vorto Esperanto kaj de EDE en la reto. Grafikaĵo indikas fortan kreskon de homoj petantaj rete informojn pri Esperanto tuj post la elektoj.

Renato Corsetti

## Laŭdo por la KER-ekzamenoj el Brazilo

“Finfine, post multaj jaroj, mi trovis tempon (kaj kuraĝon) por submetiĝi al la UEA/KER-Ekzameno. Mi nun profitis de la eblo fari ĝin en la komforto de mia hejmo. Mi volas gratuli la teamon de <edukado.net>, sub la gvido de Katalin Kovats, pro la altkvalita nivelo de la ekzameno, kaj teknike kaj lingve. Aparte mi laŭdas la klopodojn de la teamo por disponigi senpagajn provekzamenojn kaj konsilojn por la kandidatoj. Miaj poentoj estis sufiĉaj por sukcese trapasi ĝin, sed mi povintus atingi pli altan rezulton, se mi diligente profitintus de tiuj provekzamenoj. Tiel mi malkovrintus miajn malfacilaĵojn en la lingvo kaj povus studi ilin antaŭ la ekzameno.

Por mi persone la ekzameno estis tre utila por scii nun tion, kion mi ankoraŭ devas plibonigi en la regado de la lingvo. Tiel la ekzameno estas same utila ankaŭ por tiuj, kiuj ne sukcesis trapasi ĝin. Indas menciigi, ke jam 2.764 homoj sukcese trapasis la KER-ekzamenojn kaj tio estas impresa kvanto, kiu montras la viglecon de nia komunumo. Mi instigas ĉiujn esperantistojn submetiĝi al la UEA/KER-ekzameno.

Emilio Cid, Brazilo.

**SMG:** Via EKO-kreanto konfirmas, ke ankaŭ li trapasis la ekzamenon C1, la plej alta grado tiutempe akirebla. Tio okazis en Kulturcentro Greziljono antaŭ ĉ. dek jaroj.

## Pli ol ses cent aliĝoj por la UK en Aruŝa

En la 2-a de julio aliĝoj por la UK en Aruŝa kreskis ĝis 623 personoj el 64 landoj: Kongo DR 58, Burundo 58, Germanio 49, Francio 49, Tanzanio 35, Italio 30, Japanio 29, Koreio 27, Ĉinio 26, Usono 25, Pollando 20, Brazilo 20, Belgio 17, Britio 13 kaj Hispanio 13.

### **Afriko: ekstera efiko pro la UK**

Afable *Tanzania Times* ĵus publikigis artikolon pri la venonta UK en Aruŝo.

<https://tanzaniatimes.net/nearly-600-delegates-from-65-countries-to-attend-world-esperanto-congress-in-tanzania/>

Aktuale la informo aperas eĉ grande sur la ĉefpaĝo: <https://tanzaniatimes.net>.

Jen informoj pri tiu unua afrika UK, inkluzive de la Unua kaj Dua Bultenoj

<https://uea.org/kongresoj>.

Lu Rolshoven.

### **Afriko - la verda kontinento?**

Jen informoj pri la Asocio de Verduloj Esperantistaj. AVE partoprenos en Aruŝa, ankaŭ en la Movada Foiro.

1) per-Esperanto-agado: projektoj kadre de la 17 Celoj de Daŭrigebla Evoluo:

<http://www.verduloj.org/afriko.htm> kaj la aktualaj informoj pri nia kunlaboro kun afrikaj samideanoj: <http://www.verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf>

2 ) por-Esperanto-agado: informi Verdajn Partiojn kaj partianojn pri la avantaĝoj de Esperanto: [http://www.verduloj.org/ave\\_2024-05.pdf](http://www.verduloj.org/ave_2024-05.pdf)

La asocio de Tutmondaj Verdaj Partioj prezentas sian Ĉarton ankaŭ en Esperanto. La versio de 2023 estas en la angla, hispana kaj Esperanto (ankaŭ tiu de 2012), malpli novaj en la araba, bahasa indonesia, bengala, ĉina, franca, germana, hinda, japana, mongolia, nepala, portugala, sveda kaj **swahila**.

<https://globalgreens.org/about/charter/>

Nia retejo: [verduloj.org](http://verduloj.org) konservas ĉiujn gravajn informojn ekde la fondiĝo en 1984. Ni komencis modernan retejon, sed tiu ankoraŭ ne enhavas ĉion:

<https://verdularo.com/>

Manfred Westermayer (sekretario de AVE)

## Radio en Togolando – elsendo de la 26-a de junio

- 1- Libereco: Rovema el Togolando
  - 2- Poemo legita de Mioranantena Raveloharison el Madagaskaro
  - 3- Prelego de Mireille (Mirejo) Grosjean.
  - 4- Malaika: Miriam Makeba (kanto de Tanzanio)
  - 5- Historio de la unua UK en Afriko de Adjé Adjevi. #UEA #109uk #esperantoplus #ilei
- Aŭskultu nin per la ligilo. <https://www.facebook.com/share/v/TSdfUSzHKwykNwWY/>

Koufionou Koffitche, Lomeo, Togolando

## Multlingveco diskutata diverslingve

Fine de junio okazis internacia konferenco kun la ĉeftemo *Eŭropo kaj lingva diverseco* en la Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano. Ilona Koutny prezentis anglalingvan prelegon *Multilingualism and an alternative common language*. (Multlingveco kaj alternativa komuna lingvo). Ĝi elvokis viglan diskuton en la angla kaj germana. Partoprenis ankaŭ Alicja Sakaguchi, same profesoro de UAM, kiu havas esperantistan familion.

===== vortoj: 1150 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komunikaĵoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikaĵo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunikaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikaĵoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

## La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikaĵojn pere de retlisto.